# 37. Kiujn Dio elsavis (Psa 107)




3. En mallum' ili sidis,
en fero kaj katen',
ili eliĝon ne vidis
el ombro kaj el ĉen',
help-kriis en sufer',
Di' ilin liberigis,
kondukis el mizer',
al taga lumo gvidis.

4. En malsan' ili statis,
premitaj de ĉagren',
manĝ o j n  ili malŝatis
pro naŭza abomen',
help-kriis en sufer',
Di' ilin liberigis,
kondukis el mizer',
al resaniĝo gvidis.

5. Maraj ondoj ekŝvelis
pro granda uragan'.
Malgraŭ la ŝtorm' ili velis
tra l' ŝaŭma ocean',
help-kriis en sufer',
Di' ilin liberigis,
kondukis el mizer',
al urb' havena gvidis.

6. = 1.

*KIUJN DIO ELSAVIS • M (Psalmo 107): 1543, Ĝenevo 1551, LvK p. 186 • E (originale verkita): Albrecht Kronenberger 2002*

*Oni povas ripeti la unuan strofon ankaŭ post la strofoj 2 ĝis 4.*